

# Leteroj el Svedio - Suplemento

Jen klarigoj pri fakvortoj kaj maloftaj vortoj,  
kiujn nespertaj Esperantistoj eble ne konas.

Paĝo

- 3 **miri**: surpriziĝi pro io stranga, neatendita
- 4 **celi**: direkti energion al atingo de aparta rezulto
- 4 **instanco**: landa aŭ loka administraro
- 4 **jubileo**: festo pri grava datreveno
- 4 **reklamo**: anonco al la publiko por instigi aĉeton de varo aŭ servo.  
*Britoj ĉe la 88a Universala Kongreso de Esperanto en  
Gotenburgo ĝuis la afablan servon kaj bonan manĝon  
ĉe Restaurang EAT, Södravägen 77, 41254 Göteborg;  
tel. 031-181330 (apud la muzeo de monda kulturo kaj la  
Universum scienca muzeo).*
- 4 **turneo**: vojaĝo, kun difinita vizitplano, por prezenti spektaklojn  
aŭ prelegojn en diversaj urboj aŭ landoj
- 5 **gamo**: serio de similaj aferoj – ekzemple muzikaj notoj
- 6 **ĵurio**: grupo de homoj, kiuj kune decidis rezulton de konkurso  
aŭ proceso
- 6 **kupolo**: duonsfera tegmento, ekzemple la supra parto de  
monumento
- 9 **abio**: arbo kun mallarĝaj folioj, kiuj restas dum la vintro
- 9 **akcipitro**: birdo kiu ĉasas aliajn birdojn kaj malgrandajn  
bestojn
- 9 **elteni**: toleri
- 9 **kubuto**: meza parto de brako, kiu ligas la malsupra kaj supra  
partoj
- 9 **piceo**: arbo simila al abio
- 9 **plaŭdo**: la malforta sono de falo de akvo sur malmola surfaco
- 9 **trotuaro**: irejo, rezervita por piedirantoj, flanke de strato aŭ  
ŝoseo
- 11 **antropologo**: spertulo pri la evoluo de homaj rasoj

## Leteroj el Sevido - Suplemento

- 11 **haveno**: ŝirmita loko, sekura por ŝipoj
- 11 **pasero**: malgranda, tre ofta birdo
- 11 **pramo**: boato, kiu portas homojn kaj veturilojn trans rivero aŭ markolo
- 12 **dungi**: konsento, pagi al homo pro ties laboro
- 12 **etno**: grupo de homoj kun samaj prauloj
- 12 **koŝmaro**: timiga songo
- 13 **imposto**: deviga pago por la ĝenerala bezonoj al ŝtato, urbo, ktp
- 13 **kluzo**: baseno en kanalo kun pordo-similaj akvobariloj, por levi aŭ mallevi la akvonivelon por ebligi al ŝipo iri de unu nivelo al alia
- 13 **vando**: interna maldika mureto, por dividi ejon
- 15 **rubriko**: titolo kaj artikolo en ĵurnalo, gazeto aŭ revuo
- 15 **sketi**: gliti, ekzemple sur glacio aŭ per radoj sub la ŝuoj
- 15 **veti**: riski monsumon aŭ valoraĵon je, ek., la rezulto de konkurso
- 16 **igluo**: neĝdometo de Eskimo (Inuito)
- 16 **pedagogio**: arto instrui kaj eduki infanojn; scienco pri tia instruado
- 16 **tenti**: provi instigi iun al malpermesata, danĝera aŭ malbona ago
- 17 **gazono**: herbejo zorge kreskigita kaj ebene tondita
- 17 **pneŭmatiko**: tubo, plena je aero, ĉirkaŭ rado de veturilo
- 17 **siluro**: fiŝo rivera, sen skvamoj kaj kun barbfadenoj sur la kapo
- 19 **falĉi**: detranĉi herbon aŭ grenon per falĉilo
- 19 **krepusko**: milda (ofte rozeca) lumo de la malalta suno matene aŭ vespere
- 19 **runo**: skandinava skribo-simbolo, el malnova alfabeto
- 19 **tumulo**: amaso da ŝtonoj kaj teraĵoj, kiun prauloj ŝovis super tombejo
- 22 **bingo**: ludo de ŝanco: ofta amuzo en kluboj por maljunuloj
- 23 **ventoli**: refreŝigi la aeron en fermita spaco

## Leteroj el Sevido - Suplemento

- 24 **krono**: sveda monunuo (ankaŭ ĉapelo de reĝo)
- 25 **pugo**: tiu korpoparto, kiu tuŝas tion, sur kiu oni sidas
- 25 **ŝraŭbo**: speco de najlo kiun oni preme turnas por fiksi
- 25 **tenajlo**: fera prenilo, uzata por ion teni, eltiri aŭ tranĉi
- 26 **TTT**: Tute-Tera Teksaĵo, parto de la interreto
- 27 **debuti**: unuafoje sin prezenti antaŭ la publiko, aŭ paŝi unuafoje en novan medion
- 29 **aŭlo**: granda ĉambro por gravaj eventoj
- 29 **avangardo**: tiuj kiuj esprimas novajn ideojn en arta aŭ teknika kampo
- 29 **kahelo**: plato el bakita kaj glazurita argilo; kovras murojn kaj plankojn
- 29 **naĝi**: sin movi tra akvo
- 29 **scintili**: brili, lumetante de tempeto al tempeto
- 30 **baleno**: grandega besto mara
- 30 **flosi**: resti supre en likvaĵo
- 30 **truto**: fiŝo bongusta
- 31 **bombicilo**: malgranda, belkolora birdo
- 31 **remi**: puŝi boaton antaŭen per longaj lignaj iloj
- 32 **indiĝeno**: tiu kiu loĝas en la lando, kiun okupis siaj prapatroj dum multegaj jaroj
- 35 **gongo**: pendanta disko el metalo kiun oni frapas por signali aŭ por voki homojn
- 35 **pilko**: globo uzata en diversaj ludoj – speco kaj grandeco laŭ bezono
- 35 **ŝinto**: japana kredosistemo kun forta estetiko pri la natura mondo
- 36 **magra**: malgrasa
- 36 **mentono**: malsupra parto de la vizaĝo
- 37 **vestiblo**: enira parto de domo/konstruo, tra kiu oni atingas ĉambrojn

## Leteroj el Sevido - Suplemento

- 38 **gurdi**: fari aŭtomate, kvazaŭ senpense (kiel turni la krankon de gurdo, kiu estas malgranda portebla orgeno)
- 38 **rondelo**, sonato, valso: klasikaj stiloj de muziko
- 40 **fuĝo**: forkuro de io timiga
- 40 **testudo**: besto rampula, entenata en korneca kiraso
- 41 **ekrano**: blanka surfaco sur kio oni montras lumbildojn aŭ filmojn
- 41 **lanta**: malrapida
- 41 **lupo**: sovaĝa hundo. ‘Oni krias pri lupo’; se oni ofte krias nenecese, neniu atentos okaze de vera danĝero
- 42 **tavolo**: maldika etenditaĵo da iu substanco sur io alia
- 43 **reliefo**: malalta skulptaĵo sur ebena surfaco
- 44 **nostalgio**: emocia rememoro pri sia hejmo aŭ la pasinteco
- 45 **kalumnii**: ataki ies honoron aŭ karakteron per mensogaj akuzoj

¶¶

Ĉi tiun helpliston kompilis Norah Brown kaj Vilĉjo Walker.